




tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



**Inform-
agado en
Argentino**

**Konferenco
de ILEI
en Benino**

**DVD pri
Esperanto
en pola gazeto**

Karaj legantoj!

En ĉi tiu numero vin atendas diversaj kontribuoj, kaj el la interno de TEJO kaj de aktivaj membroj el diversaj landoj: La nova TEJO-komitato prezentas sin, kaj vi povos legi pri TEJO-komisionoj por Afriko, Ameriko kaj Azio. Aldone estas informoj pri Esperanto-agado en Benino, Argentino, Germanujo kaj Danujo, kaj sur la lasta paĝo estas kalendareto de Esperantaj aranĝoj inter Decembro 2008 kaj Aŭgusto 2009.

Bedaŭrinde ĉi tiu numero ne enhavas raporton pri la ĉijara IJK, kiun mi promesis en la pasinta numero. Nun ŝajnas verŝajne, ke ne plu aperos iu raporto, ĉar ne troviĝis homo ema verki ĝin ... sed por koni la etoson de IJK ĉiukaze estas pli bone mem partopreni ĝin ol nur legi raporton, do aliĝu jam al la sekva IJK en Liberec' en Ĉeĥujo (tejo.org/ijk)!

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Marcos

Enhavo

Nova TEJO-komitato sin prezentas	3-8
6a Sub_18-renkontiĝo en Germanujo	9
Esperanto-informado	
en Argentina Eduka Ekspozicio	10
Nekrologoj	11
Rubriko TEJO-membroj	12-13
Pasporta Servo 2009	
havos trimonatan prokraston	13-14
DVD pri Esperanto en pola gazeto	14
Konferenco de ILEI en Benino	15
Loka agado en Danujo	16-17
Reaktivigo de la komisionoj	
por Afriko, Ameriko kaj Azio	17
Interkultura lingvokurso	
en Germanujo	18
Kontakt-informoj	
kaj informoj pri TEJO	19
Kalendaro de Esperantaj aranĝoj	20
IS kaj AS – ĉu ne eblas solvo?	20

Limdato por 2009:1 – 15-a de Januaro 2009!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizaĵoj povas ricevi ĝin. Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Königwinterer Straße 204, 53227 Bonn, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: officejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Nova TEJO-komitato

En printempo la landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO nomumis novajn komitatanojn A por la oficperiodo 2008-2010. Aldone, kiel menciite en la antaŭlasta numero, TEJO havas tri novajn komitatanojn B. Dum la komitata kunveno dum la IJK ankau elektiĝis unu komitatano C.

Apud la nomo de la komitatanoj A aperas la lando, kies landan sektion la koncerna komitatano reprezentas en TEJO, aŭ la nomo de la faka sekcio, kiun li reprezentas. Niaj komitatanoj respondis al la jenaj sep demandoj:

1. Loĝloko
2. Aĝo
3. Profesio/studfako/vivokupo
4. Ĉefaj aktivaĵoj/interesoj en la Movado
5. Ŝatokupoj
6. Kion vi volas atingi dum via oficperiodo?
7. Vivdevizo

Julia HÉDOUX, Francujo

1. Cergy, apud Parizo en Francujo
2. 27-jaraĝa
3. Mi okupiĝas pri teamo de teknikistoj en laboratorio pri sensaj analizoj
4. kasistino de asocio, organizanto de Festo
5. butikumi, promeni...
6. Scii kio okazas en la aliaj landaj asocioj kaj helpi la aliajn uzante kion JEFO jam faris
7. Optimismu!



Paulina KOZUCHOVA, Slovakujo

1. hejmurbo Bratislavo (Slovakujo), sed

nuntempa studurbo Kembrigo (Britujo)

2. 20
3. studentino pri la rusa kaj nederlanda lingvoj
4. ĉefe mi simple ĝuas :)
5. lingvoj, vojaĝado, literaturo, teatro
6. mi nun ne antaŭplanu ion grandan; simple mi strebos atingi progresojn kaj plibonigojn en ĉiuj eblaj direktoj
7. ĉio iel solviĝos



Peter BALÁŽ, E@I

1. plej ofte Slovakujo (urbo Partizánske)
2. 29
3. Entreprenisto (eldonisto) / interlingvistiko (Poznan, Polujo) / Esperanto
4. E@I-kunordiganto, EEU-estrarano, eldonisto
5. scienc-fikcio, metala muziko, meditado, libroj
6. antaŭenigo de Esperanto en ĉiuj sferoj, pli profunda kunlaboro inter TEJO kaj UEA, reta progreso de E-o
7. Ne havas nur unu.



Denizo PRISKORN, Danujo

1. Esperantistplena apartamento en Kopenhago, Danujo
2. Kvarono de jarcento pli malpli
3. Mebloportisto / Firmaa komunikado-Socioscienco / Farti bone kaj funkciigi la lokan FESTOKLUBON
4. Tradukado, amuzado kaj amo
5. Kio estas tio?
6. Ke aferoj ne estu pli malbone ol kiam

mi komencis.

7. Ekkonu min kaj eksciu mem.

Julia HELL, Germanujo



1. Chemnitz, Germanujo
2. 22
3. Studentino pri Eŭropaj Sciencoj
4. Estri la Germanan Esperanto-Junularon, gvidi lokan Esperanto-Kafoklaĉon, teni kontakton al aliaj junularoj (ĉefe pola kaj ĉeĥa rilate la IJK 2009 - ;-))
5. babili kun geamikoj, ludi

saksofonon kaj aŭskulti muzikon, danci, vojaĝi

6. Vigligi la germanan movadon, informi la homojn pri Esperanto kaj ebligi valorplenan, amuzan kaj kontentigantan Esperanto-movadon.

7. Ĝojo estas la ununura afero kiu duobliĝas se oni dividas ĝin – investu en sociaj kontaktoj!

Nicola RUGGIERO, komitatano B



1. Mola di Bari, Apulio, Suda Italujo
2. 22
3. Nenifaranto; dum la libera tempo studas ĉe Interlingvistikaj Studoj en la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando

4. Dum mia aktivado mi ĉiam okupiĝis pri komunikado, varbado, TEJK-renkontiĝoj (laste en Italio) kaj organizado de renkontiĝoj (IJF). Mi tamen ankaŭ interesiĝas pri beletro eldonita en nia verda provinco.

5. Legado, verkado, vojaĝado

6. Mi esperas plu alporti valoran kontribuon al la diskutoj kaj decidoj de la Komitato, kaj, kial ne, akiri novajn spertojn kaj plivastigi miajn homrilatojn. Dum tiu ĉi oficperiodo kune kun Irmina Szustak mi okupiĝos pri TEJK (Tut-Eŭropa Junulara Konferenco).

7. "Foje mi pensas vivi en mis-tero" (Marteno Minich)

SONG Ho-young, Koreujo



1. Iksan/Pohang, Korea Respubliko (dum semestro mi loĝas en Iksan, kaj dum ferioj en Pohang)

2. 23

3. medicino

4. Organizi Esperanto-eventon; traduki en Esperanton aŭ el Esperanto; kunlabori kun alilandaj gekolegoj

5. Legado

6. Estas pluraj celoj, tamen ĝenerale mi volas stabiligi situacion de KEJ kaj havi pli intiman rilaton kun TEJO kaj aliaj landaj sekcioj.

7. Tempo dependas de tiu, kiu regas ĝin.

Joop KIEFTE, Eŭroka



1. Nederlando

2. 19 jarojn

3. Studas pri komputiloj

4. Interretaj aferoj

5. Esperanto ;)

6. Bonan kunlaboradon

7. Ne vere havas. Mi pensas ke "Ne estu malica" sufiĉe pri-skribas miajn pensojn pri aferoj.

Kaja FARSZKY, Kroatujo

1. Zagrebo, Kroatujo
2. 20
3. Studentino de perkutinstrumentoj en Muzika akademio, Zagrebo
4. Simple aktivi kiel ajn mi sukcesas
5. Muziko, vojaĝoj, Esperanto
6. bonan kunlaboron ene de TEJO kaj por TEJO
7. Neniam diru "neniam" (kroate: Nikad ne reci "nikad")

**Łukasz ŻEBROWSKI, Polujo**

1. Varsovio, Polujo
2. 22
3. Studento de konstruado ĉe Varsovia Vivsciencia Universitato; redaktoro de Esperanto-redakcio de Pola Radio
4. Organizado de Esperantaj aranĝoj (momente IJK 2009 en Ĉeĥio, AS 2008 en Slovakio kaj E@I-Seminario en Pollando), estrado de Pola Esperanto-Junularo, aktivula trejnado, Esperanta ĵurnalismo (Pola Radio, Varsovia Vento Elsendoj, Pola Esperantisto)
5. Vojaĝoj, promenoj tra Varsovio, fotado, muziko, politiko, amaskomunikiloj, libroj, velado
6. Organizi IJK-n en Liberec kaj E@I-Seminarion en Pollando, daŭrigi aliajn miajn E-aktivaĵojn
7. -

**Matthias HUMET, Belgujo**

1. Belgujo
2. 21
3. studas inĝenieradon
4. Reprezenti landan sektion
5. homoj, sportoj, danci, muziko, festumi, legi, ...
6. pli klara rigardo je TEJO kaj aliaj
7. "Laboru pli saĝe, ne pli severe." povus esti unu

**Nico HUURMAN, Nederlando**

1. Delft, Nederlando
2. 21
3. Studento pri Civila Tehniko/Inĝenierado
4. Lingvaj aferoj, financoj
5. Lingvoj
6. Revigligi NEJ-n, bona kunlaboro kun TEJO
7. Mi ne havas, ĉiu agu laŭ sia eblo kaj emo por atingi siajn idealojn.

**AMANO Yayoi, Japanujo**

1. Tokio, Japanujo
2. 28
3. oficisto en kompanio
4. vigligi junularan movadon en Azio
5. legi librojn (ĉion krom hororo), vojaĝi, ludi kun hundo, kuiru
6. kontribui al TEJO kiel aziano
7. Estu pozitivita



Felix ZESCH, Germanujo



1. Berlin, Germanujo
2. 25
3. Doktoriganto pri logistiko
4. Publika agado kaj informado, muziko
5. Aikido, ŝako, vojaĝi orienten
6. Plibonigi la informilaron de TEJO

7. La mondo troviĝas je la alia flanko de la pordo.

Marek BLAHUŠ, Ĉeĥujo

1. Loveno, Belgujo
2. 22 jaroj
3. studento pri komputa lingvoscienco, momente eksterlande per Erasmus
4. Mi revivigis la Ĉeĥan Esperanto-Junularon, nun estras ĝin kaj celas gvidi ĝin
5. ĝis tia stato kiam aliaj homoj povos transpreni la estradon de mi. Fake mi interesiĝas pri komputil-lingvistikaj projektoj rilataj al Esperanto kaj aktivas en la organizo E@I.



5. Programado, lingvoj, genealogio, geokaŝado, Vikipedio, himnoj, kristana junularo
6. Esti bona prezidanto de la ĉeĥagermana-pola LKK kiu okazigos kune kun TEJO la 65-an IJK en Liberec' - unuafoje en Ĉeĥio.
7. La rikolto ja estas abunda, sed la laborantoj estas malmultaj. (Mat 9,37)

Magnus HENOCH, Svedujo

1. Gotenburgo, Svedujo

2. 24 jaroj
3. Programisto
4. Zorgas pri la bonfarto de SEJU, estante estrarano de ĝi
5. Komputilumado, bekflutumado, vojaĝado
6. Plenumi la devoj de komitatano, kontaktigi SEJU-n kaj svedajn esperantistojn kun alilandanoj.



7. "Ne faru evidente stultajn aferojn."

Marjam AMIRDUST (Farmehr), Irano

1. Teherano, Irano
2. 25 jaroj
3. Mi studis la Anglan literaturon. Mi estas tradukistino; tradukas librojn (mia propra prefero estas sciencfikcia kaj fantazia literaturo).



4. De 2007, mi estas prezidantino de Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO) kaj ankaŭ komitatano de TEJO.
5. Mi tre interesiĝas pri lingvaj aferoj, precipe pri la antikvaj lingvoj. Mia ŝatokupo estas traduko de antikvaj lingvoj al la lingvo de Irano. Mi ankaŭ faras kungfuon, mi nun havas nigran zonon.
6. Mi kaj miaj geamikoj reaktivigis IREJO-n, do ni nuntempe havas multajn laborojn por prezenti Esperanton al Iranaj junuloj kaj ni esperas ke ni havos bonan kunlaboron kun TEJO.
7. Ĉiam estas ie ŝanĝo!

Gonzalo SIRIO, Argentino

1. Bonaero, Argentino
2. 25 jarojn
3. Ekstera komercado
4. Homa/Kultura/Spirita Unueco.
5. Tro por elnombri, mi kredas :P
6. Fari ke la homoj KONU la lingvon. Se iu volas lerni ĝin, devas esti VIA decido nur.
7. Ne havu devizon!! Ĉio ŝanĝiĝas (sed povus esti "Ni Estas Unu", tio neniam ŝanĝiĝos;)

ADJE Adjevi , Togo

1. Lomeo, Togo
2. 29 jaroj
3. Hotelisto
4. Vic-estro de la nacia komitato de UTE (landa asocio de UEA en Togo), membro de la Afrika Komisiono de UEA, kunredaktoro de la ĉefa toga periodaĵo "Alvoko", sekretario de loka Esperanto klubo kaj kasisto de Fonduso Esperantista por Interhelpado kaj Mikro-kreditoj.
5. Kuirado, sportumado, verkado kaj amikeco per Esperanto
6. Doni iom da afrikaneco al TEJO, sukcese preparante la grundon por pli efika kaj konstanta informfluo inter TEJO kaj landa sekcio de Togo.
7. La volo favoras sukceson ke oni estas talenta aŭ ne: necesas persisti.

**Michael Boris MANDIROLA, Italujo**

1. Novara, Italujo
2. 20
3. Studento pri komputil-inĝenierado



4. Organizado de renkontiĝoj, instruado de esperanto, informado en lernejoj aŭ aliaj junularaj situacioj.
5. Esperanto (sed por mi ĝi ne estas nur ŝatokupo), teatro, lego
6. Plian internacian kunlaboradon inter la landaj sekcioj de TEJO kaj, ĝeneralsence, kreskon de la junulara Esperantomovado.
7. "Manĝu bone!" :) sed ankaŭ "Ne faru al aliaj homoj tion kion vi maldeziras al vi mem."

Felipe de Oliveira Queiroz , Brazilo

1. Florianopolis-SC kaj Santos-SP, ambaŭ en Brazilo
2. 23 jaroj (21-a de novembro 1984)
3. diplomiĝa studento pri geografio
4. Mi estas ĵus-prezidinto kaj aktuala sekretario de BEJO, krom nova komitatano A de TEJO. Tamen mi ne estas burokrato kiu nur volas postenojn, mi jam gvidis stud-grupojn pri Esperanto en mia universitato kaj ankaŭ estas grava disvastiganto de la lingvo, ĉu en Santos, ĉu en Florianopolis, ĉu tra la interreto.
5. Esperanto (kompreneble!), bierumi, interretumi, lerni pri pluraj aferoj, praktiki tajĝiĉuanon, kaj multe pli...
6. Hmmm, mi ne scias! Sed mi ŝatus se pli da sudamerikanoj TEJO-aniĝu. TEJO, kvankam estas monda organizo, estas



sufiĉe tro eŭropeca laŭ mi.

7. Aŭdace mi diras: helpi ŝanĝi la homaran socion. Tial mi ankaŭ estas esperantisto, heheh

Nia komitatano de Burundio respondis al la demandoj de la rubriko "TEJO-membroj":

- *Kiel vi nomiĝas?*

SABIYUMVA Jérémie

- *De kiu lando vi venas, kaj kie vin un loĝas?*

Mi naskiĝis en Burundio, je la suda parto de mia lando kaj nun mi loĝas en Bujumbura la ĉefurbo de Burundio.

- *Kiom da jaroj vi havas?*

26.

- *Kiel vi esperantistiĝis?*

Mi havis unuan kontakton kun Esperanto en la jaro 2000 per mia angla instruisto. Mi ne havis sufiĉan tempon por lerni multon de li,

kaj translokiĝis al la ĉefurbo pro studaj kialoj. Mi daŭris la lernadon per Interreto je la hejmpaĝo de JEFO, kaj sukcesis la 10-lecionan kurson, kaj poste daŭrigis kun Gerda malaperis. Mi post tio havis kontaktojn kun aliaj esperantaj organizoj. Mi nun estas Membro de Afrika Komisiono de UEA, Delegito, Junulara Delegito de UEA, Ĝenerala Sekretario de nia landa Asocio (ANEB), Prezidanto de la Junulara Esperantista Burundia Organizo (JEBuO), kiu estas la plej juna sekcio de TEJO kaj Reprezentanto de MELS (Monda Esperanta Ligo por

Sporto). Mi ankaŭ estas membro de UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio).

- *Kiujn ŝatokupojn vi havas?*

Ĉefe Esperanto kaj Interreto. Tiuj du aferoj jam eniris mian ĉutagan vivon. Mi multe uzas Interreton por Esperantaj aferoj, interalie korespondado kun miaj amikoj, oficiala korespondado kun organizoj Esperantaj, kaj aliaj privataj aferoj kiuj rilatas al miaj studoj. Al tiuj du ŝatokupoj aldoniĝas legado, verkado, vojaĝo kaj diversaj renkontiĝoj.

- *Kio estas via devizo?*

Kunlaboro kaj unuiĝo por sukceso.



Ĉu vi sciis ke en TEJO Tutmonde – same kiel en Pasporta Servo – la familiaj nomoj kutime estas skribataj tute per grandliteroj (majuskloj)? La kialo por tio estas ke en diversaj kulturoj ekzistas diversaj kutimoj pri la ordo de la nomoj: Dum en Ameriko, Aŭstralio, la plej multaj Eŭropaj landoj kaj pluraj aliaj landoj oni skribas la familian nomon **post** la persona nomo, en Hungarujo, okcidenta Afriko, Ĉinujo kaj kelkaj aliaj partoj de Azio oni skribas la familian nomon **antaŭ** la persona nomo. Ni ŝatas konservi la originan ordon de la nomoj, sed tamen informi niajn legantojn, kiu parto de la nomo estas familia kaj kiu persona.

Kiam neniu parto de la nomo estas skribata tute per grandliteroj, tio signifas aŭ ke neniu parto estas familia nomo (kiel ĉe Islandaj nomoj), aŭ ke la redaktisto ne povis eltrovi, kiu parto de la nomo estas la familia nomo.

Kiam vi kontribuas al TEJO Tutmonde, vi povas faciligi la laboron de la redaktisto se vi mem indikas per grandliteroj ĉiun familian nomon.

6a Sub_18-renkontiĝo en Naumburg (Germanujo) de la 29-a ĝis la 31-a de Aŭgusto 2008

En la lasta semajnfino de Aŭgusto en la urbo Naumburg la 6an fojon okazis la renkontiĝo Sub_18.

Temas pri speciala renkontiĝo por junuloj en la aĝo inter 15 – 25 (sendepende la lingvokono) kun ĉirkaŭ 12 partoprenantoj ĉiujfoje. Tiu grandeco ebligas altkvalitan renkontiĝon, ĉar tiel en la 2-3 diversaj lingvokursoj (por komencantoj, progresintoj kaj fluparolantoj) la junuloj povas bonege lerni Esperanton aŭ plibonigi sian lingvokonon.

Krom la kursoj ĉiam okazas urbo-ĝvidado, diversaj kaj multaj ludoj, babilrondoj, dolĉaĵmanĝegado ktp.

Dum tiu renkontiĝo oni ankaŭ prezentas kiel grandaj Esperanto-renkontiĝoj funkcias (ekz-e IJK, IS, AS, ...). Tiel novuloj jam havas ideon kaj ankaŭ kialon iri al pli grandaj renkontiĝoj.

La venonta Sub_18 renkontiĝo okazos en la suda parto de Germanio, inter la 9-a kaj la 12-a de Aprilo 2009. Homoj el la tuta mondo estas invitataj.

Se vi havas demandojn aŭ volas pli da informoj, vizitu la (etan) retpaĝaron de Sub_18: www.esperanto.de/sub18

kaj spektu la Sub_18-filmon: de.youtube.com/watch?v=DPPITPUAe30

Kore salutas
Leo SAKAGUCHI
(ĉeforganizanto de
la Sub_18-renkontiĝo)



Partoprenantoj de la 6a Sub_18-
renkontiĝo en Naumburg

TEJO-membro deĵoris en "Argentina Eduka Ekspozicio"

Ĉiujare en la Argentina ĉefurbo Bonaero, okazas dum la vintraj ferioj, tio estas dum la monato de aŭgusto, speciala "Eduka Ekspozicio". La ekspozicio okazas ĉiam en la plej granda ekspozicio-centro de la urbo nomita "La Rural". Partoprenas ĉiuj

universitatoj, lernejoj, institutoj kaj koncernaj komercistoj de lerneja materialo. Oni montras la tutan variecon de la kursaro kaj karieroj studeblaj en la urbo mem kaj en aliaj ĉefaj urboj de la lando.

La Argentina Esperanto-Movado partoprenis kun propra stando, kiu estas vizitata de pli ol mil personoj, ĉefe junuloj, al kiuj estis disdonitaj fakfolioj, informo kaj la eblo enskribiĝi por kursoj en la reto kaj en la Lernejo de Esperanto en la urbo.

Dum la tritaga ekspozicio, de la naŭa matene ĝis la naŭa vespere volontule deĵoris ĉefe Cecilia PRUDKIN (antaŭa TEJO-komitatanino A por Argentino) kaj aliaj membroj de la loka movado.

Ĉiuj informoj pri la Argentina Esperanto-movado aperas daŭre en la paĝo www.esperanto.org.ar



Cecilia PRUDKIN kune kun aliaj lokaj aktivuloj ĉe la informbudo

R. SARTOR, jarlibro paĝo 100

Ne forgesu rekotizi!

Jes, jam alvenis la tempo por remembiĝi en TEJO (aŭ repatroniĝi) por 2009. Bonvolu frue rekotizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2009 okazos en Ĉeĥujo)! Memoru, TEJO estas via asocio - helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2009! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

Nekrologoj

La 18an de aŭgusto forpasis en Zweibrücken (Palatinato, Germanujo) Günther BECKER, honora prezidanto de TEJO. Li lernis Esperanton je la aĝo de 15 jaroj kaj ekde 1951 aktivis en la movado. Li estis prezidanto de TEJO de 1956 ĝis 1964, kaj sekve ĝenerala sekretario de UEA ĝis 1974. Profesie instruisto, li entuziasme okupiĝis pri la diskonigo de Esperanto per radioelsendoj kaj tradukis plurajn librojn.



Ni funebre memoras Toni RÓZSA, kiu forpasis komence de septembro. Dum multaj jaroj ŝi aktivis en la Hungara Esperanto-Junularo, laste kiel ano kaj animo de la organiza teamo de IJK 2008 en Szombathely.

Rubriko TEJO-membroj

Ĉi-foje aperas en la rubriko *TEJO-membroj* burundiano, kiu aliĝis al TEJO per la Fondaĵo Canuto. Mi invitas ĉiun leganton sendi sian sinprezenton por publikiĝo en ĉi tiu rubriko.

- *Kiel vi nomiĝas?*

NSABIYUMVA Eric

- *De kiu lando vi venas, kaj kie nun loĝas?*

Mi naskiĝis en Burundio kaj mi nun loĝas en Buĵumbura, la ĉefurbo de Burundio.

- *Kiom da jaroj vi havas?*

Mi havas dudek kvin jarojn; mi naskiĝis la 1-an de Junio 1983.

- *Kiel vi esperantiĝis?*

Estis en Aŭgusto 2006 kiam mi unuafoje aŭdis la vorton “Esperanto” de sinjoro Jérémie kiu loĝis en la apuda hejmo en mia loĝkvartalo. Mi scivoleme petis klarigojn de li; bonŝance li kuraĝe kaj bone informis min pri kio temas. Tiam mi forte deziris lerni tiun lingvon ĉar nature mi multe interesiĝis pri lingvoj; aldone al miaj denaskaj lingvoj (svahila kaj burundia) mi estas bona parolanto de la franca kaj la angla. Sekve mi demandis lin pri maniero, laŭ kiu mi povos lerni tiun lingvon, ĉar tempo al mi vere mankis; tiutempe mi estis okupita pro universitataj zorgoj. Jérémie donis al mi dokumentojn por komenci la lernadon; aŭtodidakte mi rapide progresis en la scio de la lingvo. Post du semajnoj mi kapablis esprimi miajn opiniojn; tiu sinjoro amis min pro tiu kuraĝo. Tiam mi jam finis la unuan parton kaj li donis al mi la libron *Gerda malaperis* kiu multe riĉigis mian vortaron esperantan.

Post unu monato mi jam komencis traduki kelkajn rakontojn Burundiajn al Espe-ranto.

Verdire, mi rapide starigis mian staton esperantistan, ĉar je la komenco de la jaro 2007 iu deo naskiĝis en mia kapo: “Fari kolekton pri la Burundia literaturo tradicia”. Tuj mi kunigis Esperanto-gelernantojn kiujn mi instruis ĉe la publika Universitato kaj ilin informis pri mia celo. Ĉar mi ilin senpage instruis, ili siavice akceptis helpi al mi farante serĉojn en la centra biblioteko. Post kvin monatoj mi jam kolektis sufiĉajn informojn pri tiu temo. Mi mane skribis tiun verketon. En la monato de Marto 2008, UEA donacis al la nacia Esperanto-asocio kvar komputilojn, tiel ke mi profitis el tiu donaco por redakti la rezulton de mia kolekto jam farita. Estis tiel ke mi pretigis la unuan Esperantlingvan verkon pri burundia beletraĵo: ENKONDUKO AL LA BURUNDIA TRADICIA LITERATURO

La ĉefa celo en mia kapo estis prui al miaj kunuloj ke eĉ la tradicia literaturo burundia povas esprimiĝis Esperante. Vere ili mokis min dirante ke mi oferas mian tempon por nulaj aferoj; aldone ili min certigis kaj deziris komprenigi al mi ke Esperanto ne povis esprimi Burundiajn realecojn ĉiutagajn.

Mi ne ĉesis: mi starigis la interretan periodaĵon semajnan tra kiu mi ofte

publikigas burundiajn realecojn ĉu tradiciajn ĉu nunajn pere de la komuna interreta adreso de burundianoj kaj kelkaj eksterlandanoj, kaj certe tio bone disvolviĝadas ĉar nuntempe Burundia kulturo estas konata en Esperanta medio dank' al tiu periodaĵo "EKSCIU".

Laste mi tradukis la verkon: KONTRAŬ AIDOSO farita de tekstoj etaj kiuj estas plenaj de konsiloj pri la maniero laŭ kiu la adoleskantoj povas batali kontraŭ tiu plago planeda. Eĉ Esperanto-progresantoj povas eltiri kelkajn esprimojn.

Mi nun estas finanta la unuan volumon de mia memtraviva romano: KOMPATINDA AVENTURO DE NYANTORE I, kiu laŭ mia plano aperos en tri volumoj.

En esperantaj organizaĵoj mi ĝis nun ankoraŭ ne okupis iun postenon; mi estas simpla membro de la Nacia Esperanto-Asocio (ANEB).

- Kiujn ŝatokupojn vi havas?

Krom mia kariero de studento, vere nur Esperanto estas la sola ŝatata okupo mia.

Esperanto estas mia vivo ekde mia esperantiĝo en 2006. Verdire mi ofertas la plimulton de mia tempo por la progresigo de ĝi. Mirinde miaj kamaradoj min ne komprenas kiam mi povas zorgi pri Esperanto, havante aliajn zorgojn pri miaj universitataj aferoj (kursoj), sed por mi Esperanto jam kaptis mian psikologion, kio signifas ke mi sentas min treege fieri kiam mi ofertas mian forton por konatigi mian landon en Esperantaj medioj. Mia sonĝo tuj fariĝos realo ĉar la burundia kulturo per kiu burundiano identigis sin inter pluraj nacioj dum multaj jaroj tuj estos konata pere de la verketo pri ties literaturo. Kiel vi mem scias, estas la literaturo kiu transdonas la elementojn kulturajn.

Fine Interreto min plurfoje okupas, sed pro Esperantaj aferoj kiujn mi serĉas aŭ publikigas.

- Kio estas via vivdevizo?

La kunlaborado kaj la kunhelpado estas la solaj vojoj por stabiligi la mondon. Kaj pere de ili, la monda fariĝos la eta vilaĝo.

Pasporta Servo 2009 havos trimonatan prokraston

En la antaŭa numero de TT, vi povis legi ke TEJO planas renovigi Pasportan Servon. Unua parto de tiu plano estas reta administra datumbazo. Gastigantoj povos pli facile konfirmi kaj ŝanĝi, kaj la kompilanto havos multe malpli da laboro.

Oni konstruos kaj testos tiun sistemon ĝis la unua de januaro, kaj ni volas uzi ĝin por kompili eldonon 2009. Tial ni

decidis prokrasti la kutiman konfirmadon kaj kompiladon. La plano nun estas jena:

2008-12-01: dissendo de paperaj konfirmopetoj

2009-01-01: dissendo de retaj konfirmopetoj

Dum la venontaj monatoj ni traktos la konfirmojn kaj kompilos la libron per la nova sistemo. Provizora plano:

- Januaro: traktado
- Februaro: mapoj, bildoj, kompilado ktp
- Marto: al presisto
- Aprilo: presado
- Majo: dissendo
- Junio: alveno

Vidu ankaŭ jenan temposkemon:
http://www.tejo.org/vikio/Pasporta_Servo_2

Ni tre esperas je la komprenemo de uzantoj kaj gastigantoj, precipe ĉar multaj 'senpagaj' libroj de eldono 2008 ne alvenis ĉe la gastigantoj.

Krome, estas planoj por gastiga retejo por Pasporta Servo. TEJO pripensos kiumaniere plej bone krei tion, dum oni

konstruos la retan administran datum-bazon. Tiu plano ne neglektu la multajn senretulojn, kun atento por la sekureco de informoj, kun bona financa plano ktp. Kiam la reta administra datumbazo bone funkcias, kaj kiam estas bona plano por la gastiga retejo, oni konstruos ĝin ekde januaro 2009.

Ni esperas ke en junio 2009 ni ne nur havos novan eldonon kaj pli facilan konfirman sistemon, sed ankaŭ modernan gastigan retejon.

Laŭ informoj de Derk Ederveen, kompilanto de Pasporta Servo

DVD pri Esperanto en pola gazeto

DVD kun la simpla titolo "Esperanto" aperis la 10-an de septembro en 2008 kiel aldonajo en la grava pola taggazeto Gazeta Wyborcza kun la rekorda eldonkvanto de 364.000 ekzempleroj. Ĝi aperis en ĉiuj eldonoj de la gazeto kiel senpaga kromaĵo, kaj la aperigon de la disko en la gazeto financis la urbo Bjalistoko. La diskon kreis la organizaĵo E@I.

La disko estis kreita laŭ la mendo de la urbo Bjalistoko.

Multaj polaj esperantistoj aĉetadis dum la tago po 10-20 gazetojn kun la disko, kun la celo disdoni ĝin al siaj konatoj kaj por uzi ĝin kiel taŭgan kaj malmultkoston informilon.

En la disko "Esperanto" oni promenas kvazaŭ tra fabela, virtuala Bjalistoko kaj vizitas unuopajn konstruaĵojn de la urbo. Ĉiu konstruaĵo havas sian apartan

signifon kaj utilon. Aperas konstruaĵoj kiel Lernejo (kursoj de Esperanto de kelkaj niveloj), Kinejo (ses filmetoj pri Esperanto), Muzikejo (kantoj en Esperanto kun tekstoj), Gazetgiceto (prezento de kelkaj gravaj Esperanto-gazetoj), Esperanto-muzeo (informoj pri Zamenhof, pri Esperanto-aranĝoj, pri organizaĵoj...), Biblioteko (kelkaj famaj verkoj en Esperanto)...

La vizitantojn de la urbo (uzantojn de la disko) bonvenigas en la urbodoma konstruaĵo de Bjalistoko la urbestro Tadeusz Truskolaski mem per mallonga filmeto – li salutas homojn kaj en la pola kaj en Esperanto).

Legu la tutan artikolon de Peter Baláž en Libera Folio ĉe liberafolio.org/2008/gazetawyborcza

Laŭ Ret-Info

La konferenco de ILEI en Portonovo, Benino

Finfine okazis la konferenco de ILEI en Afriko, en Benino, en la urbo Portonovo. Partoprenis konferencanoj el jenaj landoj: Nederlando, Francujo, Japanujo, Ĉehujo, Britujo, Aŭstralio, Litovujo, Italujo, Togo, Benino, Ebura Bordo, Burundo, Ganao. Entute 42 partoprenantoj ĝuis tiun konferencon.

La 30-an de julio 2008 malfermiĝis la konferenco per la levo de la verda flago. Estis kantita varme la himno *La espero* ĉeeste de la reprezentanto de la urbestro. Solene estis prezentitaj la oficialaj salutmesaĝoj de UEA, fare de Hori Yasuo, de ILEI fare de Isikawa Tieko, kaj la salutmesaĝo de la LKK fare de Charles Alofa, de la Afrika oficejo de UEA fare de Francis Agbenou. Tuj poste okazis la akcepto de la urbestro al la esperantista delegitaro por komune manĝi tutamikece.

Venis la momento prelegi pri homaj rajtoj, sub la gvido de Renee Triolle, kaj poste de prelego pri plantoj kaj vitaminoj sub la gvido de Jean-Pierre Boulet, Lingva festivalo sub la gvido de Vlad'ka Chvatalova, Lingva ludo sub la gvido de Ana Montesinos, prezentado de projekto "Mondo-rondo" de Latifou kaj la ekzamenoj sub la gvido de Mireille Grosjean.

Bele la konferenco tre buntiĝis pro multaj aktivaĵoj rilataj al lingvo-kono, okazo renkonti nekonatajn amikojn, kultura festivalo dum kiam estis prezentita rava koncerto de Mayuko Tazima kaj de Hori Yasuo, kiuj dancigis ĉiujn konferencanojn je la sono de japana gitaro. La tuta ĉambro entuziasmiĝis kaj aŭdeblis ĉie kantkrioj kaj dancpaŝoj.

Okazis ĉefe multaj diskutoj pri la plibonigo de la situacio de Esperanto en Afriko.

Ĉiuj konferencanoj multe ĝojas pro tiu bela evento kiu ebligis al ili pli bone koni la evoluon de Esperanto en Afriko kaj en diversaj landoj de Afriko.

La 5-an de aŭgusto 2008 okazis la solena fermo per oficiala voĉo de Aida Csizikaite, reprezentanto de ILEI en la konferenco.

La Afrika Oficejo dankas al UEA, ILEI kaj al ĉiuj, kiuj materie kaj finance helpis al ĉi tiu konferenco.

Estis omaĝo al Esperanto, omaĝo al Afriko, omaĝo al ILEI kaj al UEA. Soifas ĉiuj regustumi tiajn eventojn en Afriko.

Kodjovi Francis AGBENOU
Oficisto en la Afrika oficejo de UEA

Loka agado en Danujo



Ĉinaj patkukoj kaj Ludovik-kuketoj

Tiuj du estis la allogaĵoj, kiam la Esperanto-Kultura Grupo (EKG) de Frederiksberg (Grandkopenhago konsistas el la du komunumoj Kopenhago kaj Frederiksberg) sin prezentis al la publiko la 6-an de Septembro.

La administrejo de Frederiksberg ĉiujare petas tiujn asociojn kaj klubojn, kiuj aktivas en la komunumo, prezenti sin dum la Tago de la Klubo, inter ili EKG.

Konsiderante, ke nenio logas pli dum tiaj ekspozicioj ol io manĝebla, EKG estis sin preparinta por ekspozicii la kutimaĵojn, librojn, broŝurojn, diversspecan varbmateriaron (Dankon al TEJO pro la subteno!) . Inter ili specialan atenton kaptis du grandformataj tavoloj kun fotoj, kiuj montris la diversajn facetojn de la Esperanta vivo. Ĉiu foto estis en DIN A 4 formato kaj kun klariga subtitolo.

Sed multe pli logis freŝe preparitaj patkukoj faritaj laŭ ĉina recepto. Multaj vizitantoj sekvis la instigon de siaj nazoj kaj scivoleme rigardis, de kie venis la bonodoro. Kaj tiam estis nur malgranda paŝo al aĉeto de patkuko. La standodeĵorantoj povis eluzi la okazon doni al la vizitantoj informojn kaj varbmateriaron pri Esperanto, inter ili folion kun la patkuk-recepto en Esperanto kaj kun bildetoj por ĉiu preparpaŝo sur unu flanko kaj kun vortlisto, iom da gramatiko kaj informoj pri la lingvo sur la dorsa flanko.

Aliaj vizitantoj pli deziris dolĉaĵojn. Por ili EKG estis akirinta Ludovik-kuketojn de la Esperanta dolĉaĵbakejo Kroppenbergo en Germanujo. Tiuj Ludovikuketoj estas 35-gramaj tavoloj da marcipano, kovrita per malhela



Fotoj de Peter WEIDE

ĉokolado kaj – reliefa, lerte farita busto de Zamenhof. Tiuj, kiuj deziris akiri la dolĉaĵon, estis petataj doni dudek danajn kronojn (proksimume tri eŭrojn) al EKG kaj kiel dankon ricevis Ludovik-kuketon. Tute nature ofte venis la demando, kiu estas la viro sur la kuketo, kaj jam ni havis denove eblecon, iom informi pri Esperanto.

Sur unu el la du scenejoj Kim HENRIKSEN dum preskaŭ duonhora prezentis kantojn en Esperanto sur la ĉe li kutima alta profesia nivelo, akompanante sin mem sur akordiono. Ankaŭ li eluzis la okazon, informante inter la kantoj pri la lingvo, en kiu li kantas.

La Tago de la Klubo daŭris de la 11-a matene ĝis la 16-a posttagmeze. Tiun

tagon EKG plenenergie eluzis por prezenti Esperanton kaj informi pri la lingvo kaj ĝiaj ebloj.

Peter WEIDE



Reaktivigo de la komisionoj por Afriko, Ameriko kaj Azio

La TEJO-estraro volas reaktivigi la komisionojn por Afriko, Ameriko kaj Azio, kiuj jam de longa tempo ne plu aktivis. Tiucele, post esplorado ĉe aktivuloj, novaj komisiitoj nun troviĝis kaj ĵus estis kreataj diskut-listoj por ili.

TEJK (Tut-Eŭropa Junulara Konferenco) ankaŭ de iom da tempo malaktivas, pro tio, dum tiu renoviĝo ni insistis pri reformiĝo en TEJK.

Ni ĝojas anonci ke la novaj TEJO-komisiitoj estas:

Por Ameriko: Rodrigo CYRINO (plej konata kiel Ĥod) el Brazilo. Diskutlisto: groups.google.com.br/group/tejo-ameriko

Por Afriko: SABIYUMVA Jérémie el Burundio. Diskutlisto: groups.google.com.br/group/tejo-afriko

Por Azio: SONG Ho-young el Suda Koreio. Diskutlisto:

groups.google.com.br/group/tejo-azio

La novaj komisiitoj por TEJK estas Nicola RUGGIERO (Italio) kaj Irmina SZUSTAK (Pollando), ambaŭ komitatanoj B de TEJO por 2008-2010.

Diskutlisto:

<http://groups.google.com.br/group/tejk>

Via partopreno estas tre grava por ke la ligo inter TEJO kaj Landaj Sekcioj estu pli forta. Aliĝu al la listo, diskonigu ĝin en via landa sekcio.

Tiel ni pensas ke proksimaj kaj najbaraj landoj povas helpi unu la alian, kun interŝanĝo de sperto, infomoj kaj kun amikeco. Helpe de la listoj ni klopodos fortigi kaj unuigi la junularan movadon en tiuj regionoj.

Rogener PAVINSKI, Brazilo
TEJO-estrarano pri Landa Agado

Interkultura lingvokurso en Kassel, Germanujo


En la somero 2008 partoprenis mi la kvar-semajnan lingvokurson de la Konsilio de Eŭropo, al kiu mi aliĝis kun helpo de TEJO. Ĝi estis tre interesa kaj lingvo-instruado estis altnivela. Krom instruado de la germana linvo ni vizitis plurajn germanajn vidindaĵojn kiel la kastelon Wartburg, la urbojn Kolonjo, Düsseldorf, Fulda ktp. La libertempon pasigis mi kun samklasanoj, en Kassel ni vizitis koncertojn, naĝejon, varmobanejon, lokajn junularajn organizojn, promenis en la parko, ludis diversajn eksterajn kaj tabelajn ludojn kaj tiel plu. La horaro de la tago estis ĉiam la sama: ekde la 8-a horo ĝis duono antaŭ la 13-a estis lingvoinstruado, poste tagmanĝo kaj paŭzo, ekde la 14-a ĝis duono antaŭ la 17-a estis programo de la Konsilio de

Eŭropo kaj alitempe estis libertempo. Matene mi devis ellitiĝi je duono antaŭ la 7-a... Sed la loĝado estis alie tre agrabla. Ni loĝis ĉe germanaj gastigantoj, pluraj en Lohfelden, vilaĝo sep kilometrojn for de Kassel. Mi babilis multe kun mia gastigant-familio kaj ekkonis germanan vivmanieron kaj kulturon.

La kurson organizis la lingvolernejo Europa Kolleg (www.europa-kolleg.de) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo, kiu ankaŭ pagis plejparton de kostoj. Partoprenantoj pagis po 100 € kaj ricevis loĝadon, manĝon kaj instruadon. Ĉiu partoprenanto devis aliĝi kun la rekomendletero de sia organizo (miakaze TEJO). Bedaŭrinde kelkaj partoprenantoj-samklasanoj parolis tre

malbone germane kaj en libertempo ili parolis ĉiam angle. Alia problemo estis malbona urbotrafiko en Kassel. Sed malgraŭ tio la kurso estas tre rekomendinda kaj mi bedaŭras, ke ĝin nur unufoje eblas partopreni. Mi dankas na TEJO kaj niajn instruistojn de Europa Kolleg – Rainer kaj Tanja.

Andrej REPISKÝ



Andrej kun afiŝo por prezenti nian organizon

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Militärstrasse 14, 8004 Zürich, Svisujo
Retadreso: anna-laura@tejo.org

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5, Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon havi blogon ĉe tejo.org
- eblon involviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

Decembro-Januario

27-29 Decembro: Komuna Seminario en Jokohamo, Japanujo. Renkontiĝo de aziaj junuloj. Rete: tejo.org/eo/node/784

27 Decembro – 3 Januaro: 52-a Internacia Seminario en Biedenkopf, Germanujo. Tradicia junulara aranĝo. Temo: "Katastrofoj". Rete: is.esperanto.de

27 Decembro – 4 Januaro: Ago-Semajno 2008 en Liptovský Mikuláš, Slovakujo. Junulara aranĝo, ĉi-foje en Slovakujo anstataŭ Polujo. Rete: pej.aplus.pl/as/2008/

Majo

01-10: 21-a Esperanto-Festivalo "Aroma Jalto" en la krimea urbo Jalto, Ukrainujo. Rete: ulej.org.ua/aj

Junio-Julio

Junio 28 – Julio 6: Esperanto-renkontiĝo dum Roskilde-festivalo apud Roskilde, 35 km de Kopenhago, Danujo. Ĉiu partoprenanto laboras dum 24 horoj en la DEJO-budo; senpaga partopreno kaj manĝado. Rete: dejo.dk/agadejo/roskilde-festivalo/venu-al-roskilde-festivalo_2009/

7-12 Julio: 9-a Kultura Esperanto-Festivalo en Helsingør, Danujo. Festivalo kun altkvalita originala Esperanto-kulturo. Rete: kef.saluton.dk

18-25 Julio: 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO en Liberec', Ĉeĥujo. Temo: "Liberec'". Rete: tejo.org/ijk

**Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: eventoj.hu/kalendar.htm
Kalendaro, al kiu ĉiu povas mem aldoni Esperanto-aranĝojn: mondakalendaro.org**

IS kaj AS – ĉu ne eblas solvo?

Esperanto estas lingvo de samideanoj. Ĝi ebligas al ni vojaĝi kaj renkontiĝi kun amikoj el la tuta mondo. Kial do ni daŭre devas elekti vintre inter amikoj en IS kaj amikoj en AS? Ĉu ne estas jam tempo ke la Polaj kaj Germanaj organizantoj formetu sian rivalecon kaj solvi tiun problemon?

Dum ĉiu somera renkontiĝo ni aŭdas 'venu al IS' aŭ 'venu al AS'. Oni daŭre memorigas nin ke Esperantujo estas dividita, kaj kvazaŭ revivigas la feran kurtenon kiam okcidenteŭropanoj povis iri al la IS, kaj orienteŭropanoj devis resti je sia flanko de tiu divido tra centra eŭropo.

Mi volas pasigi novjaron kun miaj amikoj, kaj ekkoni novajn homojn de ĉiuj

partoj de la mondo. Ĉu mi iru al la IS, kaj por la deka fojo en la sama lando, aŭ ĉu mi iru al AS al kiu mankas sufiĉaj Esperanto-parolantaj esperantistoj?

La sekvan IJK organizos poloj kaj germanoj kune. Ĉu vere ni havos duonon de la organizantoj varbante kontraŭ la alia duono? Ĉu tiom dividita estu Esperantujo ĝis aŭ la IS aŭ AS mortos?

Ĉu ne eblas ke Germanoj kaj Poloj trovu iun solvon ke ni denove havu grandan imponan vintran eventon kie ĉe-estas ĉiuj amikaroj? Aŭ ĉu daŭre restos du mezgrandaj, mezbonaj kaj mez-indaj eventoj kiuj batalas unu kontraŭ la alia anstataŭ progresigi nian karan lingvon?

Sennoma kontribuo